Protokolo de la estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo merkredon la 21-an de januaro 2026 per Zoom

**Ĉeestis** Bård Hekland, Jardar E. Abrahamsen, Lars Sandbakk, Claude Rouget, Harald Rygg kaj Marianne Lund.

**1. Aprobo de la tagordo**
La tagordo aprobiĝis.

**2. Trarigardo de la protokolo de la pasinta estrara kunveno la 19-an de novembro 2025**
La protokolo de la pasinta estrara kunsido aprobiĝis. Komenoj pri la traktitaj punktoj:

- La mono de legaco Uhlen alvenis antaŭ la jarŝanĝo.
- Ekestis kontakto kun elektristo. La laboro ankoraŭ ne komenciĝis.
- Fenestristo atendos pli varman veteron antaŭ ol ŝanĝi la fenestrojn.
- Reststoko de lasta numero de Norvega Esperantisto estas plusendita al Tromsø.
- Skandinava retkunveno okazis la 10-an de decembro kun kelkpersona partopreno de NEL.

**3. Jarraporto**
La jarraporto 2025 sekvas la formaton de la antaŭaj jaroj. Ni prilaboris la tekston kaj fintraktos ĝin dum la venonta estrara kunveno.

**4. Jarkalkulo**
La kasisto prezentis la jarkalkulon. Ĝi nun estas prilaborata de la revizoro.

**5. Jarkunveno**
Jarkunveno okazu rete la 4-an de junio je 18.30-20.30. Post la jarkunveno estu prelego, same kiel en 2025. La tuta kunsido daŭru prefere ne pli ol ĝis 21.00.

**6. Imposta rabato por membreco en NEL**
Ĉu donacoj aŭ kotizoj al NEL povus kvalifiki por imposta rabato?  Ni esploru, ĉu laŭ Skatteloven § 6-50 tio povas koncerni nin.

**7. Eventualaĵoj**
En Brønnøysund-registro daŭre aperas la antaŭa prezidanto Mario Szilveszter Machlik kun subskribrajto. La estraro decidas, ke la nuna prezidanto Bård Hekland havu subskribrajton anstataŭ Mario Szilveszter Machlik. Claude Rouget kaj Jardar Eggesbø Abrahamsen daŭre havu subskribrajton. Ĉiuj tri havas apartan subskribrajton.

***På norsk (for Brønnøysund-registeret):*** **I Brønnøysund-registeret har den forrige styrelederen Mario Szilveszter Machlik fortsatt signaturrett. Styret vedtar at nåværende styreleder Bård Hekland skal ha signaturrett i stedet for Mario Szilveszter Machlik. Claude Rouget og Jardar Eggesbø Abrahamsen skal fortsatt ha signaturrett. Alle tre (Hekland, Rouget og Abrahamsen) har signaturrett hver for seg.**

**8. Venonta estrara interkonsiliĝo**
La venonta estrara interkonsiliĝo okazos la 4-an de marto je 20.30.

Protokolis Marianne Lund